


Numero 41

FAMILIA ESPERANTO n-ro 08 (1/2003)



---

# ***FAMILIA ESPERANTO***

**NEREGULA CIRKULAĴO  
DE RONDO FAMILIA**

---



## REDAKTORA ANGULO

*Belan novan jaron al tiuj, por kiuj ĝi fariĝis 2003 kaj ankaŭ al esperantistoj, kiuj skribas ĉe la jarindiko alian numeron.*

*La vivcirkonstancoj, de mi ne dependaj, pasintjare malebligis al mi eldoni ankaŭ la 3-an numeron de *Familia Esperanto*. La jarkomencna apero de ĉi-numero donas esperon, ke eĉ se kun eventualaj perturboj, sed ĉi-jare vi ricevos la cirkulaĵon almenaŭ 3 fojojn.*

*Temoj, materialoj ne mankas al mi. Jam nun vi havas enmane ion "plidikiĝintan" legaĵon: anstataŭ la antaŭaj 16 paĝoj nun 20 da ili. Trouu sur ili tion, pri kio vi interesigas kaj kiam vi mem spertos - aŭdos - vidos ion dividindan inter vi, skribu al mi. Mi ĝojos ricevi vian mesaĝon, leteron.*

*Amike,  
Katarína.*

**Respondeculo de la UEA-komisiono pri RONDO FAMILIA estas Amri Wandel. La membroj estas Katarína Bodnárová, Renato Corsetti, Jouko Lindstedt, Stefan MacGill kaj antaŭ nelonge estis al ĝi alnomumita ankaŭ**

## JAMES REZENDE PITON

### Jen lia sinprezento:

Mi estas 32-jaraĝa komputilisto, kiu okupiĝas pri industria aŭtomatigo de sciencaj eksperimentoj en la brazila sinkrotrono situanta en mia urbo. Mi esperantistiĝis en 1988 kaj post tri monatoj mi fariĝis IM de UEA. En la jaroj 1995-97 mi estis TEJO-estrarano pri informado. De 1996 mi agadis en la UEA-Komisiono por Ameriko, unue kiel helpanto kaj poste kiel komisionano. Dum la lastaj kvar jaroj mi redaktis ties novaĵleteron kaj aliajn porokazajn eldonaĵoj.



Isis kaj James

Antaŭ kelkaj monatoj mi anoncis mian intereson lasi tiun oficon, kaj mi nun plu zorgos nur pri la hejmpaĝo de tiu Komisiono, denove kiel volontulo, sub: <http://www.geocities.com/espameriko>.

Krom lokaj agadoj, en la brazila E-movado mi iam helpis starigi sukcesan perretan Rebato-Servon de BEJO kaj nun mi respondecas pri la fako "Eksteraj Rilatoj" de Brazila E-Ligo, por kiu mi estas unu el la du A-Komitatoj de Brazilo ĉe UEA.

Mia intereso pri la temo *familia uzo de Esperanto* estas malnova, sed ĝi forte revigliĝis pro mia antaŭnelonga edziĝo al esperantistino. Ni intense uzas Esperanton inter ni, sed ni ambaŭ estas portugallingvaj brazilanoj. Estante psikologo, Isis - mia edzino, ege interesiĝas pri kunlaborigaj ludoj kaj partoprenigaj interagadoj, kiujn ni antaŭvidas utilaj al estontaj aranĝoj en niaj E-familiaj medioj tie ĉi.

Mi esperas alporti pozitivan kontribuon al la Komisiono, almenaŭ el la vidpunkto de amerika movadano, kun nia realo de entuziasmaj sed disaj esperantistoj en ampleksa kontinento.

**James Rezende Piton**  
james.piton@iname.com



## KIEL SENPERFORTE VENKI MALJUSTECON?

Ni, kiel homoj, havu kuraĝon solvi niajn problemojn pere de dialogo kaj intertraktoj. Parolante ni nenion perdas, dum tro multon ni perdas sekve de perforto kaj milito.

En la nuna **"Internacia Jardeko por Kulturo de Paco kaj Senperforto por la Infanoj de la Mondo" (2001-2010)** ni ĉiuj, kiel fratinoj kaj fratoj, staras antaŭ la defio trovi novajn manierojn por forigi la profundajn radikojn de perforto kaj el niaj propraj koroj kaj el la mondo.

Mairead Corrigan Maguire  
(Nobelpremio por paco, 1976)  
tradukis: Jacques Tuinder

*Laŭ: Dia regno n-ro 3, 2002*




## LINGVA ANGULO

En Esperanto abundas PARONIMOJ. Ili ofte konfuzas kaj komencantojn kaj spertulojn. Ĉu vi konas la ĝustan signifon de la unuopaj vortoj?

|                 |                      |
|-----------------|----------------------|
| fronto - frunto | klara - klera        |
| justa - ĝusta   | konduki - konduki    |
| katuno - kotono | konfidi - fidi       |
| kazo - kaŭzo    | konscio - konscienco |
| kazeo - kazuo   | korpo - korpuso      |

Laŭ: *Brasikfolio, sept.-okt. 2002*

- 1 - iriloj
- 2 - piedapogiloj
- 3 - kubo
- 4 - rulringo
- 5 - saltoŝnuro
- 6 - mantenilo
- 7 - kajto
- 8 - rulsketiloj
- 9 - ludkuboj
- 10 - skutilo
- 11 - balancĉevalo
- 12 - pupo



Laŭ: *Ni parolas Esperante (Vladimír Němec)*

Michael Kox <michael@lerni.info> en Germanio ellaboris novan ludon **MEMORHELPILO** por memorigi vortojn dum lernado. Vizitu: <http://www.lerni.info/>

Laŭ: *Esperanto en Danio, jan. 2003*

### FABELO INTERNACIA

En 2002 la Päätalo-instituto en Finnlando aldonis por la tria fojo E-branĉon al sia fabelkonkurso por infanoj. La ĉefpremion FABELO INTERNACIA ricevis la 12-jara STEFANI STRUNJAK el Kroatio pro sia fabelo *Kiel formikbebo savis la formikejon kaj konatiĝis kun Avo Frostoj*.

La Julavo efektive transdonis la premion al Stefani sur la ĉefplaco de Zagrebo en ĉeesto de 20000 homoj. La Kroata Televido poste elsendis la tutan eventon.

### KIE ESTAS LA SKOLTOJ?

<http://ttt.esperanto.org/skolta/sm.html>

La retbultenoj de la Skolta Ĉ-Ligo: <http://ttt.esperanto.org/skolta/sm2002.pdf>

Nur por legi: <http://ttt.esperanto.org/skolta/sm2002.html>

## LINGVA JARFINO EN BRAZILU

### Nova maniero pasigi (someran) Silvestron en Esperanto

En San-Luiso de Paraitingo, tre eta urbo kun domaro el la kolonia epoko de Brazilo, dudeko da e-istoj (plejparte geedzoj) kunestis de la 28-a de decembro ĝis la 2-a de januaro. Ĝi estis verŝajne la unua tiuspeca aranĝo en Brazilo, kie lokaj kaj regionaj renkontiĝoj okazas tra la tuta jaro. Lingva Jarfino tamen havas la celon apliki Esperanton ne per prelegoj kaj kursoj, sed per vivigo de la lingvo en ordinaraj kaj malstreĉaj situacioj dum pluraj tagoj.

Tri E-denaskulinoj ĝuis la okazon koni unuj la aliajn. Tiel ili konstatis, ke la lingvo ne estas “afero de nur iliaj gepatroj” kaj ili ricevis la atenton de novaj “E-geonkloj”. Flavio Rebello, la iniciatinto, post kelkaj tagoj rimarkis progreson en la aktiva parolado de sia plej juna filino Fernanda.

Kunludado, pupteatraĵoj, komuna pretigo de manĝaĵoj, ekskursoj al la naturo, spektado de E-filmoj kaj interŝanĝo de spertoj pri denaskismo estis kelkaj el la ĝuindaj programeroj, kiujn oni okazigis en tiu unua aranĝo. Oni rimarkis plurajn plibonigendajn detalojn de la funkciado. Tio aplikiĝos en la ĉi-jara Lingva Jarfino, kiu okazos en urbeto baldaŭ anoncota. Venu pasigi somerplenan Silvestron en Brazilo!  
<http://www.geocities.com/lingvajarfino>

**James R. Piton, Brazilo** *james.piton@iname.com*



Vizito al naturrezervejo en la marborda montaro estis unu el la eblaj programeroj por la partoprenantoj de Lingva Jarfino en Brazilo

## **JUNA KAJ TALENTA** **KRISTOĈJO RESENDE (en la brazila Cristóvão)**

**Naskiĝis: 18.01.1988**

**Loĝloko: Brasília**

**Kristoĉjo estis nur 10-jara, kiam aperis kaj populariĝis en Esperantujo la libro “La knabo frenezeta”.**

**La eta tradukanto intertempe 15-jariĝis kaj esperantigis plian libron. Helpe de lia zorgema patro, esperantisto Roberto Resende (krom patreco ankaŭ stomatologo kaj Ĉe-instruisto) ni sukcesis atingi la “famulon” kaj havi de li respondojn al kelkaj demandoj.**

*Kiam vi kontaktis Esperanton la unuan fojon?*

De kiam mi estis en la ventro de mia patrino, mia patro parolis al mi nur en Esperanto. Mi do ne vere lernis la lingvon, ĝi fariĝis mia natura posedaĵo. Perfektiĝi en ĝi helpis min multaj Ĉ-lingvaj infan-libroj, ludiloj, muzik-diskoj kaj kasedoj.

*De kie venis la ideo traduki?*

La fama verkisto de “La knabo frenezeta”, Ziraldo, iam venis en mian urbon. Por renkonti lin mi iris en librovendejon. Li rimarkis, ke mia patro kaj mi parolas iun al li nekonatan lingvon kaj demandis pri ĝi. Kiam ni diris al li, ke temas pri Esperanto, li ege ekinteresiĝis pri ĝi. En sia juneco li ofte aŭdis pri ĝi, sed poste eĉ supozis, ke Esperanto formortis.

Kiam mia patro montris al li la Esperantan Tinĉjo-libron: “La nigra insulo”, li tuj reagis per: “Vi devas traduki al mi ‘La knabo frenezeta!’” La respondo de mia patro estis: “Interkonsentu kun mia filo!”

Kaj tiel komenciĝis la longa laborado. Dum la semajn-finoj mi ne plu ludis aŭ promenis. Mia patro volis, ke mi nur sidu ĉe la komputilo kaj faru la tradukon.

La lanĉo okazis dum la San-Paŭla Libro-Bienalo, la 4-a plej granda libro-foiro en la mondo. La libron prezentis tie Ziraldo, Samuel (La knabo, kiu aktoris en la kinofilmo laŭ la libro) kaj mi. Ni sidis ĉe tablo kaj longa hom-vico staris antaŭ ni por ricevi aŭtografojn en la librojn.

*Kiam aperis la ideo, ke vi traduku ankaŭ alian libron?*

Tiam, dum la libro-bienalo en San-Paŭlo, Ziraldo simple diris al mi: Nun vi devas traduki al mi la libron “Flicts”.

Kaj do, denove komenciĝis nova laborado. Mia patro daŭre subtenis min. Mi devas danki ankaŭ al la reviziantoj, kiuj ege helpis: Leopold Knoedt (forpasinta), Geraldo Mattos kaj Flavio Fonseca. Mi volis, ke la nomo de la libro en Esperanto estu “Flikts”, sed Ziraldo ne permesis la ŝanĝon. En 1999 aperis do la Esperanta “Flicts”.

*Ĉu la homoj en via ĉirkaŭaĵo, ekzemple viaj instruistoj kaj amikoj, scias pri via esperantisteco?*

Mi ĉiam hontis paroli alian lingvon al miaj kolegoj, sed post kiam mi estis intervjuita en la famegaj televidaj programoj "Xuxa" kaj "Joo 11:30" kaj mia foto aperis sur la unua paĝo de gazeto "Correio Braziliense", la tuta lando sciis pri mi kaj Esperanto.

*Pri kio vi okupiĝas lastatempe?*

Mi prepariĝas por esti profesia komputilisto kaj en la libera tempo mi ludas tamburaron kaj korbopilkon.

**Kie trovi la tradukojn de Kristiĉjo? Serĉu ĉe:**  
<http://www.utoxia.com.br/esperanto/ziraldo/>

**Ambaŭ libroj mendeblas ankaŭ en la libroservo de UEA. Vd. nian rubrikon LIBROBRETO.**



La patro:  
Roberto Resende



La nuna Kristoĉjo Resende

## LIBROBRETO

### Ziraldo: **LA KNABO FRENEZETA**

Rakonto pri petola dekjara knabeto en la traduko de vera 10-jara esperantisteto – Kristoĉjo Resende, en aŭtentike petola stilo. La leganto konatiĝas kun la bubo pere de ties hejmtaskoj kune kun nerajtigita aldoniĝoj, sekretaj desegnoj, preferata bildstrio, kanzonoj, sportaj kaj amindumaj atingoj...

Prezo: 9,00 eŭroj.

### Ziraldo: **FLICTS**


Elportugaligis: Kristoĉjo Resende  
Kio estas Flicts? Iom malŝablona, helbruna – koloro. Unu el tiuj, kiuj en blokoj aŭ formoj pure-nure ilustras la stiltrafe minimumajn tekstojn. Sur la grandaj paĝoj legeblas grandliteraj vortoj, belaj ideoj en amuza-neortodoksa stilo.

Prezo: 7,50 eŭroj.

### Gudrun Pausewang: **KUNIBERTO KAJ KILEVAMBA**

El la germana tradukis Nora Caragea.  
La aŭtorino estas unu el la plej popularaj verkistinoj de porinfana literaturo en Germanio. En siaj libroj ŝi traktas gravajn problemojn en la mondo kaj kiel solvi ilin. La 109-paĝa romano estas dediĉita al junaj kaj ne plu tiel junaj legantoj. Ĝi temas pri geedza paro savanta la loĝantojn de insulo.

Prezo: 9,30 eŭroj.





## ĈU ESPERANTISTA FAMILIO ?

*Veturante ĉi-jare kun slovakaj gekolegoj al Rijeka por partopreni la konsultiĝon de Mezeŭropaj E-organizoj, ni survoje babilis kompreneble pri la E-movado, pri E-organizoj. Mia multjara amikino Katja Bodnarova parolis interalie pri Rondo Familia. Tiu temo interesis min iumomente kaj mi komencis pensi, ĉu eble mi povus nomi mian familion vere "esperantista familio" ? Kaj jen kion mi konstatis.*

Pri Esperanto mi interesiĝis jam kiel knabo. En la 50-aj jaroj de la pasinta jarcento en pola gazeto por junuloj, *Swiat Mlodych* (Junulara Mondo) oni prezentis kurson de E-o. Mia onklo aĉetadis tiun gazeton kaj de tempo al tempo ankaŭ mi legis tiujn lecionojn. Eĉ iom da vortoj mi ekkonis, sed poste pro aliaj okupoj mi forgesis pri tio. Al Esperanto mi revenis dum mia studperiodo. Mi kaj mia fianĉino (nuna edzino) eĉ enskribiĝis en koresponda kurso, organizita de PEA, sed pro diversaj kialoj ni ne komencis ĝin. Post la fino de la studado kaj soldatservo (studintoj devis servi unu jaron) mi eksciis, ke en mia urbo estas organizata E-kurso. Mia plejaĝa filo Marko havis tiam preskaŭ 2 jarojn, kaj mi estis arbitraciante pri manpilko, kaj ofte forveturadis arbitracii en nian regionon. Kiam mi informis mian edzinon, ke mi volas enskribiĝi en la E-kurson, ŝi respondis: "Bone, sed vi devas elekti: aŭ arbitraciado, aŭ kurso". Mi konsentis kun ŝia propono rezigni pri arbitraciado. Certe ŝi pensis: "Mia edzo rezignos pri pantalonetoj kaj fajfilo, kaj ofte estos en la hejmo kun familio". Nun ŝi ofte diras: "Se mi sciintus, ke E-o tiel profunde kaptos mian edzon, certe mi ..... ne promesintus."

Post kelkaj jaroj naskiĝis filino Dominika, kaj jam kvarope ni partoprenis diversajn E-aranĝojn. Tiutempe mia edzino eĉ finis la unuan E-kurson. Ŝi jam scipovis interkompreniĝi kun niaj E-gastoj, kiuj ofte vizitadis nian hejmon. Post kelkaj jaroj jam kvinope (naskiĝis dua filo: Andreo) ni daŭre partoprenis diversajn E-aranĝojn. Ni kelkfoje estis dum E-feriado en Międzygorze, kaj kelkfoje en tre simpattia loko por esperantistoj, en la slovakia urbo Poprad. Tie mi konatiĝis kun neforgeseblaj Milan Zvara kaj Anton Zachariáš. Tie mi ankaŭ renkontiĝis la unuan fojon kun Katja. En la 90-aj jaroj mi multfoje kun infanoj (de tempo al tempo ankaŭ kun edzino) partoprenis UK-ojn kaj aliajn E-kunvenojn. Verdire mi ne esperantigis miajn filojn, sed la filino interesiĝas pri E-o. Mi pensas, ke mia Dominika estos ĉi-kampe mia posteulo. Mi ege ĝojas, ke mia edzino estas tre, tre tolerema, kiam ŝi jam sekvan fojon devas respondi pertelefone al iu, ke edzo estas ekster la hejmo kaj revenos je la .....(aŭ post kelkaj tagoj).

Ankaŭ mia hundo estas "esperantista" hundo, ĉar ĝi nomiĝas Fido. Estinte en Poprad, miaj infanoj ofte ludis kun la tiea hundo Fido, kaj kiam ili "konvinkis min" pri la aĉeto de hundeto, mi demandis kian nomon ni donos al ĝi. Unuvoĉe la infanoj respondis "Kompreneble ke Fido".

Nun mi ofte demandas min: "Ĉu mia familio estas vere esperantista familio, ĉu ĝi nur vivas kun Esperanto?"

**Stanisław Mandrak – Pollando**

aŭgusto 2002



## ... kaj mi mortpafis lin!

*Ĉu la ŝerca verbo “krokodili” povus timigi nialingvajn infanojn? Probable ne, ĉar ni kutime uzas ĝin en situacioj, kie eĉ la plej sentema etulo ne povus imagi fizikan aperon de tiu ja timoveka besto. Ni memoru tamen, ke tre junaj homoj foje interpretas laŭvorte dirajn, kiuj ridigas plenkreskulojn sed kaŭzas traŭmaton al la infanoj. Tion mi mem spertis tri-kvarjara.*

Mi estis revema knabeto, evidente scivola pri la mistera mondo de skribaĵoj. Eble por sproni tiun laŭdindan intereson miaj gepatroj aĉetis “edukan” telere-ton, el kiu mi manĝu. Rande de tiu metala telero estis la literoj de la angla alfabeto kaj la ciferoj 1 ĝis 9. Tiuj formoj ja ekzercis mian junan fantazion, kaj sendube miaj ripetige-maj demandoj pri ili, kaj la fakto, ke mia jam ĝene malrapida manĝritmo iĝis eĉ pli trenata, foje pensigis paĉjon kaj panjon, ke estus preferinde kaŝi la edukan telere-ton kaj redoni al mi la iaman seninteresan blankan bovle-ton.

Pri unu figuro sur la telerrando mi tamen ne demandis. Tio ne necesis, ĉar mi intuiciis, pri kio temas. En la trogranda spaco inter Z kaj 1 la telerkreinto ial decidis meti bildeton de estulo nova en mia vivo sed des pli timiga. Kelkajn fojojn mi sidis sur preĝeja benko kaj aŭskultis fascinate-terurate, dum la potencvoĉa pastro avertis pri la senlaca agado de lia Satano Moŝto, la Princo de Mallumo, “Olda Niko”, Lucifero, la falinta Ĉefanĝelo, la Malamiko de Dio kaj la homoj, Mefistofelo, Beelzebub, ni diru rekte – la Diablo. La pastro klarigis, ke ni naskiĝas kun emo peki, sed ni probable ne pekus, se la Diablo ne daŭre instigus nin malobei Dion. (Nun mi komprenis, kial mi foje sentis tenton malobei paĉjon kaj panjon.) La celo de tiu nedireble fia estulo estas venigi nin postmorte en sian fajran regnon, la Inferon, kaj tie torturi nin por ĉiam per sia tre akra forkego: nia lango ekbrulos kaj ni sopiregos al eĉ unu guto da akvo, sed la brutalo nur pririkanos nian suferadon. (Mem spertinte soifegon en varmega aŭstralia senakvejo, mi absolute ne emis ripeti la sperton postmorte). La pastro avertis nin, ke la Diablo povas maski sin kiel bela, dezirinda junulo aŭ junulino. Tiu penso malmulton diris al mi, sed ja timigis min la informo, ke la Subterulo povas aperi kiel simpatia, amuza maljunulo. Kaj jen li aperis sur mia propra telero, inter la litero Z kaj la cifero 1. Unuavide amika, amuza maljunulo: globa kapo kun larĝa rideto, malgranda ronda trunko; mallongaj kurbaj O-formaj kruroj; la dekstra mano, fine de apenaŭ ekzistanta brako, estis malfermita kaj evidente proponis ion regale. Sed dua, tria, kvara rigardoj konsciigis pri la perfidaj detaloj: apenaŭ videblaj, sed ja ĉeestaj krone de la kapego estis kornoj; inter la O-kruroj lancopinta vosto; en la kaŝita maldekstra mano estis evidente la tenilo de la tripinta forkego. Kaj plej perfide: ĉe la buŝanguloj, flanke de la elstaraj hundodentoj, estis desupra faldo, kiu konvertis la ŝajnjan rideton en rikanan grimacon.

Ofte kaj longe mi rigardis tiun bildon, pri kiu mi ne demandis. Eble la demandado pri ciferoj kaj literoj estis provo distri la gepatrojn aŭ min mem, sed ĝi certe ne trompis la grandkapan Diablon, kiu tre bone sciis, ke mi koncentriĝas pri li, ne pri tiuj aliaj duarangaj simboloj.

Imagu mian surprizegon, kiam iun tagon Satano ne restis sur mia telere-ton sed venis viziti nin tute persone. Li estis maskita – sed nur por aliaj, ne por mi – kiel ĉaskunulo de mia patro. Li ankoraŭ estis globkapa, li havis tiun saman rondan, dikan ventron, tiujn samajn mallongajn O-krurojn. La kornojn, voston kaj forkegon li sukcesis iel formeti, kaj la buŝanguloj malfermigis supren flanke de la hundodentoj, sed en kelkaj momentoj li senvorte rikanis miadirekten kaj perfidis sin. Estis alia

dubforiga detalo: la Diablo sur mia telereto estis senkolora aŭ, pli ekzakte, samkolora kiel la cetera metalo. Sed en sia homo formo tiu etkrura Diablo havis rufan hararon, kaj ial mi sciis, ke tiu detalo estas historie prava. Reliefigis mian certecon la fakto, ke oni nomis la "homon" Bluulo: tipa aŭstralia ŝerco, se temas pri rufharulo. Kaj Bluulo havis strangan suspektindan kutimon neniam antaŭanonci siajn venojn kaj forirojn: subite li materiĝis ĉe ni, kaj same subite, senklarige, li malaperis. Miaj gepatroj plendis pri tiu kutimo lia, sed mi sciis, ke tiel devas esti.

La klimakso venis iun varman vesperon, kiam paĉjo, miaj du fratinetoj kaj mi atendis en tendo apud laĝeto en sovaĝejo. Evidente mia familio pasigis kelkajn feritagojn en tiu bele senhoma loko. Sed – mi apenaŭ povis kredi – paĉjo invitis la maskitan Diablon akompani nin. Bluulo – dank' al Dio – ne loĝis en nia tendo. Li dormis en sia propra aŭtaĉo, sed kutimis kunmanĝi kun ni. Mi observis, ke li ofte kraĉis dum manĝado kaj trinkado, kaj konjektis, ke niaj normalaj homaj nutraĵoj iel ne akordas kun la bezonoj de kamufla korpo.

Ĉiun matenon kaj ĉiun posttagmezon paĉjo kaj Bluulo malaperis en la arbaron portante fusilojn. Preskaŭ ĉiufoje ili revenis kun iu predo, ĉu estis kangurupeltoj, ĉu anasoj aŭ arbaraj meleagroj. Tiutempe ekologiaj pensoj ĝenis neniun: ĉiuj sciis, ke la senlimaj arbaroj gastigas senlime ekspluateblan bestaron, kaj neniuj dubis, ke homoj rajtas senbare mortigi ĉion laŭplaĉe. Sed sciante, ke mia paĉjo estas ie en arbaro kun la Princo de Mallumo konstante streĉis miajn nervojn, kaj ĉiufoje post lia sekura reveno mi fervore ĉirkaŭbrakis lin.


La lasta vespero. Preskaŭ noktiĝis. Mia paĉjo ne revenis, daŭre ne revenis. Kiel mi sopiris al lia alta, helbrune vestita formo! Baldaŭ estos tute mallume. Aĥ, fine io moviĝis apud la lago. Mi kuris tien. Aj, estis ne paĉjo, sed Beelzebub persone! Neniu signo de mia paĉjo. Mi *devis* scii, eĉ se Satano konfirmos miajn timojn.

"Bulu-ulo," mi balbutis, ŝajnigante, ke nek li nek mi scias pri lia vera nomo, "kie 'stas mia paĉjo?"

Eĉ la malforteco de la lumo ne povis kaŝi la demonan rikanon. "Li frenezigiĝis kaj mi mortpafis lin."

Hodiaŭ mi scias, ke ĝuste tiu diraĵo estas kutima respondo, kiu signifas nur, "Mi havas nenian ideon, kie li estas." Sed en tiu momento mi knabeto paralizigiĝis, dum la Malamiko de la Homaro forkrablis sur siaj mallongaj O-kruoj. Eble pasis nur du, tri minutoj ĝis kiam mia patro, ĝoja pro tre bona predaĵo, aperis en la sama loko. Lin surprizis, ke mi, kiu ŝatis prezenti min kiel fortika juna viro, petas lin porti min brake al la tendo.

**Trevor Steele**



Trevor Steele  
kun sia filo David  
en la somero de 2002

## KIAL NEMOVADANO UZAS ESPERANTON

Jam kiam mi estis infano, estis natura parto de mia scio, ke Esperanto funkcias. Mi aŭdis, ke mia avo (Preben Bagger) flue parolas, kaj mi spertis, ke li aktive uzas ĝin dum siaj vojaĝoj kaj inter siaj amikoj.

Malgraŭ tio dum multaj jaroj ne estis parolo pri tio, ke mi mem lernu la lingvon. Por mi ĝi ne estis alloga. Sed tiam io okazis. Somere de 1994 mia avo komencis prepari mondvojaĝon kun 3 semajnoj en San Francisco kaj 3-semajna vojaĝo tra Aŭstralio. Mia patrino duonŝerce proponis, ke li kunportu ankaŭ min, mian fratinton kaj mian kuzinon, sed ŝi aldonis: "Tiam vi ja lernu Esperanton, ĉar dum la tuta vojaĝo vi estos inter E-parolantoj." Do, ni 3 knabinoj decidis, ke ni lernos Esperanton ĝis 1997, kiam la vojaĝo fakte okazis.

### En San Francisco (SF)

La 3 unuaj semajnoj de nia vojaĝo estis studado en universitato de SF. Tie estis E-kursoj en 4 niveloj por homoj de la tuta mondo kaj kun alte kvalifikitaj instruistoj de Usono kaj Aŭstralio. Instruistoj kaj studentoj loĝis kune en apartamentoj, apartenantaj al la universitato. Ni do estis en interesa internacia medio, kie Esperanto estis la natura komunikilo. Por ni knabinoj temis pri tio, ke ni lernu pli da E, dum nia avo partoprenis en la 4-a nivelo, kie oni studas la literaturon de E.

La 3 semajnoj en SF estas la sola profesinivela instruado, kiun mi ricevis pri E, sed, por esti tute honesta, mi ne plene utiligis ĝin la tutan tempon. SF estas tiel interesa urbo, ke ne ĉiam la hejmtaskoj gajnis la batalon pri mia atento.

**Eva Buchwald Christensen (Danio)**



La avo kun siaj tri nepinoj en Novjorko (1997): Eva Buchwald Christensen (tiam 21-jara), Amalie Marie Johansen (18-jara), Lise Buchwald Christensen (16 jara).

## NOVAJ PAROJ

♥ PAŬLO KAJ VELANTA CHEN-DESAILLY  
geedziĝis en 2002.

Li estas Aŭstraliano, ŝi Ĉinino.

Ambaŭ estas esperantistoj kaj bahaanoj.

Nun ili loĝas en provinco Hebei,  
sud-okcidente de Pekino. Ili kune reprezentis  
la Bahaan E-Ligon en la 3-a Azia Kongreso  
en aŭgusto 2002 en Seulo.



♥ ILJA DE COSTER kaj JULIA LITVINOVA geedziĝis la 15-an de decembro  
2002 en Sankt-Peterburgo, Rusio.

## BONVENON

✿ Lucia Mikulovská kaj Jaroslav MIKULOVSKÝ el Žilina (Slovakio)  
bonvenigis sian unuan infanon, fileton, pasintsomere.

La novalveninto havis tiam 3250 gramojn kaj 50 centimetrojn. Estis la 5-a de  
junio 2002, 16-a horo 30 minutoj, kiam MICHAL (karesnome Miŝko),  
naskiĝis.

✿ Martin kaj Simon ĝojas al vi anonci la naskiĝon de sia bela fratinetto,  
FAUSTINE, la 13-an de oktobro 2002.

La gepatroj estas Benoîte kaj Denis DENNETIERE el Faches-Thumesnil  
(Francio).

✿ La 28-an de julio 2002 naskiĝis CHRISTINA YALI, filino de Nan Wang-  
Matthias kaj Ulrich Matthias.

✿ Kun tri semajnoj da fruo, la unua filo de Lode kaj Vanessa VAN DE  
VELDE alvenis la 23-an de novembro 2002. Li nomiĝas ERWANN (bretona  
nomo, signifanta iaspecan taksuson-arbon), mezuris 50 cm kaj pezis 2,920 kg.

Miŝko [miŝko] Mikulovský  
en septembro 2002



**Sincerajn bondezirojn al la gepatroj kaj bonvenon al la etuloj!**

## IRU NI AL ...

❖ **Internacia Junulara Kongreso (IJK)**, 19. - 26. julio 2003 en la Esperantodomo en Lesjofors (inter la urboj Stokholmo, Oslo kaj Gotenburgo).

La temo estos "Al Libera KulturO" (ALKO).

Post la IJK eblas buse iri al Gotenburgo por la Universala Kongreso.

Inf.: TEJO, Nieuwe Binnenweg 176, NL - 3015 BJ Rotterdam, Nederlando

<[www.tejo.org/ijk/2003/](http://www.tejo.org/ijk/2003/)>

❖ **26-a Somera Esperanto Familia/Feria Tendaro (SEFT)**, 2. - 10. aŭgusto 2003 en tendejo: "Campingplatz am Dreetzsee" Thomsdorf, regiono de urbeto Feldberg, Meklenburgo/Antaŭpomerio.

Programo: migradoj tra la naturo, ekskursoj, kafoklaĉoj kaj vesperaj kunvenoj, prelegoj, ĉiuvesperaj fabelhoroj, banado en lagoj ktp.

Inf.: Werner Pfennig, Uns Husung 29/1104, DE - 17034 Neubrandenburg, Germanio  
tel.: 0395-4221398.

❖ **35-a Internacia Infana Kongreseto (IJK)**, 26. julio - 2. aŭgusto 2003 en apudlaga feria centro Knappekulla, en la komunumo Lerum, 18 kilometrojn norde de Gotenburgo. Loĝigo okazos en seso da lignaj dometoj, en ĉambroj kun 1 ĝis 8 litoj. Je 100-metra distanco estas lago, kie eblas naĝi, arbaro kun mirteloj kaj fungoj, apude troviĝas ankaŭ farmbienoj kun ĉevaloj. La infanoj devos kunporti proprajn lit-tukojn kaj ban-tukojn.

Inf.: Stefan MacGill, Pannonia u. 30/I/6, HU-1136 Budapeŝto, Hungario. tel.: (+36 1)349-5207, rete: <[stefan.macgill@galamb.net](mailto:stefan.macgill@galamb.net)>.

PROPONOJ KAJ SINPROPONOJ POR GVIDANTOJ KAJ HELPANTOJ ESTAS BONVENAJ NUN, ĈAR TIUJ ESTOS DECIDITAJ KOMENCE DE 2003. Aĝlimo por la infanoj: 6 - 13-jaroj.

❖ **25-a Renkontiĝo de Esperantistaj Familioj (REF)**, 5. - 12. julio, 2003 en Kulturdomo de Esperanto, alinome Kastelo Grezijono apud urbo Baugé, 220 km sudokcidente de Parizo.

Oni atendas 10 ĝis 20 familiojn kun infanoj, ĉeestantaj prefere dum la tuta semajno.

Eblas samloke partopreni antaŭ-REFan infanrenkonton, post-REFan E-kurson aŭ proksime viziti proprakoste reĝajn kastelojn de rivero Luaro.

Inf.: familia Huet-Schumann

9 rue du Couradin

FR - 35510 Cesson-Sevigne

tel.: +33-2.99.83.69.86 (hejme)

rete: [bsn@aql.fr](mailto:bsn@aql.fr)

TTTejo: <http://familioj.komputilo.org/ref2003.htm>




### **Nova juna paro preparas Eŭrop-skalan grandan vojaĝon**

Juna paro el Brives, Francio, preparas biciklan jarvojaĝon tra Eŭropo. Vidu ilian (konstruitan) ttt-ejon ĉe <http://www.veleurop2.fr.st>. Ankaŭ ekzistas pli malnova ttt-ejo <http://veleurop.free.fr/> pri ilia pasinta vojaĝo. Por subteni, sponsori, kotopi, skribu al [w.prangere@free.fr](mailto:w.prangere@free.fr)

El: *JeunEspéranto*, 2002/4.



## KORESPONDI DEZIRAS



☞ **Hua Yizhi**, 1.58 metrojn alta kaj 50 kilograma 44-jara belaspekta sana flegistino, volas korespondi kun 48 - 58 - jara viro precipe el Aŭstralio, Germanio, Francio, Svedio, Belgio, Japanio por formi internacian Esperanto-familion. Adreso: Shanghai Pudong Yang guang er cun 26 hao 504 shi, CN - 200135 Ĉinio.

☞ F-ino **Bianca Mureșan**, 21-jara komencantino, serĉas seriozajn gekorespondantojn.

Adreso: Făgetul Ierii  
Iara  
RO-3359 jud.Cluj  
Rumanio

### **GALERIO DE ESPERANTO-FAMILIOJ**

<http://familioj.komputilo.org>

**Kiel vi povis legi en la pasinta numero de FE, tiu-ĉi retpaĝo celas prezenti familiojn, en kiuj la lingvo Esperanto familie ludas rolon (ne nur estas parolata de unuopulo), helpi al interkonatiĝo kaj kontaktoj inter la koncernataj familioj. Ĝis nun aliĝis al ĝi 42 familioj.**

**La listo de FE-ricevantoj enhavas proksimume 370 adresojn. Ili povus kompletigi la ref-liston, sed sen via permeso ni ne pludonas ĝin. Tial la peto: **Bonvolu sciigi al la redaktoro de la cirkulaĵo (adr. sur p.19) vian konsenton kun la aperigo de via adreso en la reta galerio de E-familioj.****

### **INFANLIBRO DE LA JARO -**

estas nomata unu el la branĉoj de la Belartaj Konkursoj de UEA.

En 2002 kadre de ĝi ricevis la 3-membra ĵurio 3 librojn, eldonitajn de diversaj eldonistoj. Ĉiuj estis tradukaĵoj.

La **INFANLIBRO DE LA JARO 2002** estis elektita **KUNIBERTO KAJ KILEVAMBA** de G.Pausewang, tradukita kaj eldonita de Nora Caragea (vd. paĝon 8).

## NE NUR POR INFANOJ

### FAJRO-AERO-AKVO

La ludantoj sidas en granda cirklo. Unu persono ĵetas molan pilkon (el papero aŭ kaŭĉuko) al la alia kunludanto kaj samtempe vokas la nomon de unu el la tri elementoj: fajro, aero, akvo. La ludanto, al kiu la pilko estas ĵetita, devas tuj diri estaĵon, kiu vivas en la nomita elemento. Nur se fajro estas dirita, oni silentu.

### AĈETADO

Unu persono eliras la ĉambron. La aliaj interkonsentas, kiun profesion li havu, kiam li ree eniros. Ekzemple ili decidas, ke li estu maristo. Ili envokas lin kaj li devas demandi, kion li aĉetu. La unua do respondas "kompason", alia "savozonon", alia "pilolojn kontraŭ marmalsano", alia "hamakon" ktp. Se li divenas la supozitan profesion, alia persono eliras.

### FRAZFARADO (buŝe aŭ skribe)

La ĝvidanto fiksas unu vorton, ekzemple la vorton "ilo".

La ludantoj formu frazojn el tri vortoj; la unua komencu per la unua litero "i", la dua per "l", la tria per "o".

#### Ekzemple:

internaciaj ludoj okazas  
inter lupoj oscedu!  
inĝenieroj lamas ofte  
indiano lavis ovojn - ktp.

*El: Gaja leganto. P.E.Schwerin*

Por komuna ludo: **GLOSO-BLAGO.**

Ludo per lingvo.

Eldonis: Al-fab-et-o, 1999.

88 kartoj kun 1440 vortoj.

Amuza lingva ludo, en kiu oni

elpensas klarigojn kaj diversajn signifojn.

Prezo: 12,60 eŭroj.



### UDU EN ESPERANTO

Dudekon da malgrandaj, simplaj, sed diversspecaj kaj ofte vere belaj ludoj vi povas trovi ĉe:

<http://mpovorin.narod.ru/ludoj/ludoj.html>

Ili povas utili por instruado, cerbotrejnado aŭ almenaŭ por plibonigo de la humoro.

*Laŭ: Eventoj 2/dec/2002*

## BONAN APETITON!

### Aĵlosupo

Unu litro da elbaloĵo el terpomoj, 3 aĵleroj, duono da kulero da raspita zingibro, pinĉpreno da majorano, 3 dekagramoj da graso, ovoflavo, salo.

Sur la tranĉitan kaj disfrotitan aĵlon kun graso, zingibron kaj majoranon - ĉio en unu plado - ni verŝas la terpoman elbaloĵon ankoraŭ bolantan. Mallonge ni lasas la supon boli kaj dum tiu tempo ni sekigas en bakujo aŭ fritas en graso nemolan panon, tranĉitan je kubetoj, kiun ni metas en telerojn kaj verŝas sur ĝin la varmegan supon. La supon ni povas delikatiĝi per la ovoflavo; ni surtabligas ĝin kun aldono de kuiritaj terpomoj.





**KROATA ESPERANTO-LIGO INVITAS GEJUNULOJN INTER 13 - 20 JAROJ AL LA  
PROJEKTO **MEZEŬROPO ESTAS MIA HEJMO****

**Dato: 31.8. - 7.9.2003**

**Loko: apud Rijeka en Kostrena**

**Temo de la renkontiĝo: Mezeŭropo - 1. Arkitekturo de Mezeŭropo  
- 2. Mondmilitoj en Mezeŭropo**

Se vi ŝatus amikiĝi, amuziĝi, bani kaj naĝi en la pura Adriatika maro, paroli Esperanton, diri vian opinion pri iu temo, konatiĝi kun Kroatio, viziti vidindaĵojn, sunumi, nepre venu en la Esperanto-domon en urbeto Kostrena, apud Rijeka (Norda Adriatiko). La domo havas grandan terason (kie ni povas kanti, labori kaj rigardi la stelojn), 10-litajn ĉambrojn, manĝejon, kuirejon, duŝejojn kaj necesejojn.

Estos organizataj ankaŭ ekskursoj: al Rijeka (unu el la plej grandaj kroataj marurboj), Trsat (fama kroata pilgrimejo), Opatija (konata turisma urbeto ek de Aŭstro-Hungario) kaj eble Pula (kiu havas romian arenon).

Ni amuziĝos, kaj ankaŭ diskutos pri la historio de Mezeŭropo de la 20a jarcento. Aparta akcento estos sur la temo **ARKITEKTURO** (ĉar la jaro 2003 estas proklamita Eŭropa jaro de arkitekturo), komparante siajn nacilingvajn lernolibrojn, samkiel pri komunaj trajtoj kaj diferencoj inter Mezeŭropaj landoj.

**KOTIZO:** ĝis la 31-a de marto 2003 estas 125 eŭroj (po 15,63 eŭroj tage), kaj poste 136 eŭroj (po 17 eŭroj tage).

La unuaj du aliĝintoj el ĉiuj mezeŭropaj landoj pagas nur 9 eŭrojn tage (72 eŭrojn entute).

Partatempa aliĝo estas 20 eŭroj tage. Ĉiuj instruistoj ricevos subvencion por sia restado (kiom granda estos honorario de la instruisto, decidos subvencio al la projekto; vidu gravan rimarkon).

Grava rimarko: en kazo de granda subteno de la Kroata ŝtato la organizanto komplete subvencios la restadon de 2 gejunuloj el mezeŭropa lando. Mezeŭropaj landoj estas: Aŭstrio, Ĉeĥio, Hungario, Norda Italio, Suda Germanio, Kroatio, Slovakio, Slovenio. Pri ŝtataj subvencioj oni havos informojn en majo 2003! Vi ricevos konfirmilon post la aliĝo!

Al la aranĝo estas bonvenaj gejunuloj el ĉiuj landoj, ne nur el Mezeŭropo.

**PARTOPRENKONDIĈOJ**

La kotizo inkluzivas loĝadon kaj manĝadon en la Esperanto - domo, programon, litotolaĵojn. La kotizo NE inkluzivas vojaĝon, asekuron kaj ekskursojn.

**Informojn petu de: Kroata Esperanto-Ligo**

**Kneza Mislava 11/3, HR-10000 Zagreb**

**Telefono: +385 (0)1 4617550, fakso: +385 (0)1 4619373.**

**Retadreso: [esperanto@zg.tel.hr](mailto:esperanto@zg.tel.hr)**

**TTT-paĝo: <http://free-zg.hinet.hr/esperanto/>**

Judita Rey-Hudeček

## INFANAJ DESEGNAĴOJ POR GRANDA EKSPOZICIO

La E-grupo de la franca urbo Angers festos en 2004 sian centan datrevenon. Je tiu okazo oni antaŭvidas interalie oficiale patronatan internacian ekspozicion de infanaj desegnoj pri la ĝenerala temo de la “daŭra disvolviĝo” (protektado de la naturo, arbaroj, bestoj, lukto kontraŭ la polucio, lernejoj por ĉiuj infanoj, suna energio, pli sana agrikulturo, agado por havigo de pura akvo, protektado de la sano ktp.).

La plej belaj desegnaĵoj estos premiitaj kaj por la lernejoj kolektivaj sendoj oni povos antaŭvidi interŝanĝon de desegnoj kun francaj lernantoj.

La konkursantoj dividiĝos en tri kategoriojn :

- ĝis 7-jaraĝaj,
- de 7 ĝis 10-jaraĝaj,
- de 10 ĝis 14-jaraĝaj.

La desegnaĵoj estu sendotaj al:

Esperanto-Centro,

s-ro Frangeul

6, rue de Buis

FR - 49000 Angers

Francio

rete: bertrand-gilet@wanadoo.fr

*Paŭlo Balkányi*

**Poemeto por desegni homon**

**Streko. streko. streketo.**

**Jen estas la kapeto.**

**Rekta kolo.**

**Granda ventro.**

**Tri butonoj en la centro.**

**Fortaj kruroj.**

**Lertaj brakoj.**

**Sur la kapo**

**hirtaj haroj.**

**Ĉambauflanke unu komo.**

**Prefa estas ĉarma homo.**

### DESEGNIS POR NI... Hajnal MacGill (10 jara) el Hungario



## HUMURO

Interparolas du najbarinoj:

- Mia edzo ekbruligas cigaredon nur post bona tagmanĝo, - diras la unua.
- Nu, unu-du cigaredoj dum la jaro ne povas malutili al li multe, - respondas la alia.

Filo al sia patro:

- Kial vi ne volas permesi al mi ke mi veturigu? Ja mi jam estas sufiĉe aĝa por tio.
- Vi jes, sed la aŭto ankoraŭ ne!

*Ĵus aperis nova, tute senpaga ret-gazeto pri humuro kaj bildstrioj en Esperanto: Vola Püg! Serĉu ĝin ĉe: [www.volapug.net](http://www.volapug.net)*

## ENHAŬO:

2. Editora angulo
- 2.-3. James Rezende Piton
3. Kiel senperforte venki maljustecon
4. Lingva angulo  
Fabelo internacia
5. Lingva jarfino (J. R. Piton)
- 6.-7. Juna kaj talenta
8. Librobreto
9. Ĉu Esperanta familio?  
(S. Mandrak)
- 10.-11. ...kaj mi mortpafis lin  
(T. Steele)
12. Kial nemovadano uzas  
Esperanton  
(E. Buchwald-Christensen)
13. Novaj paroj  
Bonvenon!
14. Iru ni al...
15. Korespondi deziras  
Galerio de E-familioj  
Infanlibro de la jaro
16. Ne nur por infanoj  
Bonan apetiton!
17. Mezeŭropo estas mia hejmo  
(J. Rey-Hudeček)
18. Desegnigis por ni (H. MacGill)  
Poemo por desegni  
(P. Balkányi)
19. Humuro

## FOTOJ:

Titolpaĝe:

- supre: 19-a IF en Borken-Gemen  
(foto el <http://if-flg.ifrance.com/>)

- malsupre: Lingva Jarfino, E-denaskulinoj:

Helena Avila (3-jara) kaj la fratinoj  
Fernanda (1-jara) kaj Leticia (3-jara)  
(fotis J. Rezende Piton).

Dorspaĝe: de supre maldekstre:

- Danckonkurso dum IS 2002/03 en Trier

(fotis Joost Witteveen;

[joostje.komputilo.org/kunvenoj/](http://joostje.komputilo.org/kunvenoj/));

- IF - amuziĝo

(foto el la menciita retpaĝo);

- José Roberto Tenorjo instigas

la knabinojn kolorigi desegnaĵojn dum la Lingva Jarfino

(J. Rezende Piton);

- IF - gajeco

(foto el la menciita retpaĝo);

- Pluis dum la IF - ekskurso

(foto: Chuck Smith);

- LJ - Silvestra tosto de la

partoprenantoj

(fotis J. Rezende Piton)

---

**Ĉiu ricevinto de FAMILIA ESPERANTO  
povas libervole kontribui al UEA-konto  
de RF: [idoj-p](mailto:idoj-p)**

REDAKTAS: Katarína Bodnárová, CO de UEA,

Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando; [<cind@co.uea.org>](mailto:cind@co.uea.org)

